



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 256

Aŭgusto, 2007

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — Kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter

71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas \$8, por Usono \$12, kaj por aliaj landoj estas \$20

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

NICOLE KAJ PIERRE VOJAĜIS EN KANADO

Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva, ĉarmaj emerituloj el La Ciotat, vilaĝo en sudorienta Francujo inter Marseille kaj Toulon, vizitis Nov-Skotion dum tri tagoj meze de junio. Ilia filino estas instruistino kaj ili zorgas ŝian du-jaran infaninon dum la lerneja jaro. Do ili povis ĉi-somere viziti min per la Pasporta Servo, kaj ankaŭ amikojn en Otavo kaj Montrealo per luaŭto. Ili diris, ke ili neniam drinkas vinon, nek la ruĝan nek la blankan. Spite de tio mi kredis, ke ili vere estas francanoj ĉar ili spicas sian babliadon kun francismoj kiel „hu-la-la” kaj „mi dormis kiel marmoto” (marmoto estas eta mamulo kiu loĝas en la Alpoj kaj vintrodormas).

La unuan tagon ni vizitis la Artan Muzeon de Nova Skotio. Pierre estas amatora pentristo kaj la pentraĵoj tre interesis lin. Dum ilia vizito al Halifako, hazarde, grandaj velboatoj el multaj nacioj kunvenis en la haveno. Ni ĝuis ilin kaj la urbocentron. Poste ni vizitis al Peggy's Cove – tradicia kaj ankoraŭ uzata fiŝkaptanta vilaĝo sur la Atlantika marbordo. Nicole kaj Pierre rimarkis, ke ĉio en Kanado ŝajnas dise. Oni devas longdaŭre aŭtovojaĝi inter urboj, inter regionoj, inter parkoj, eĉ inter urbetoj. Ni vagis trans la arbaro de Nov-Skotio sur la ŝosejoj, kiuj laŭ ili estas pli larĝaj ol tiuj en Francujo – plej eble ĉar la fervojoj preskaŭ tute mankas ĉi tie.

La duan tagon ni iris al Grand Pré, kiu estas eta vilaĝo proksima al Fundy Bajo kie en 1755 la Britoj forpelis dise la Akadianojn (franc-devenajn koloniistojn) al la Britaj Kolonioj en Nord-Ameriko, al Karibaj kolonioj, kaj kelkajn al Francujo. Tio

estis grava historia afero en Nov-Skotio. Pierre kaj Nicole neniam aŭdis pri tio. En tiu erao, kiam Britujo kaj Francujo batalis por la rego de Eŭropo kaj la mondo, Nov-Skotio estis flanko afero. Por povi klare vidi, iufoje oni devas mem rigardi tra la okuloj de aliaj. Nov-Skotio gravas al mi, ĝi estas mia hejmo, sed en la historio kaj la nuntempo ĝi estas eta, flanko afero. Tiu pliklara memrigardo estas alia profito de la Pasporta Servo por la gastigantoj.

Samtage ni vizitis Lunenburgon, urbeto kie la plej granda fiŝkaptista ŝiparo en Nov-Skotio hejmas. Lunenburgo estas ankaŭ monda heritaĝa lokaĵo de UNESKO. La lignaj domoj kaj butikoj estas bunte farbitaj. Samstrate apud unu la alia estas verdaj, ruĝaj, bluaj, flavaj, brunaj, purpuraj konstruaĵoj kiuj havas kompleksajn formojn kun multaj lignaj ornamaĵoj. Lunenburgo aspektas unike.

La lastan vesperon la lokaj Esperantistoj kunvenis, laŭ nia kutimo kiam Esperantistoj vizitas nin. Dek personoj plenigis mian salonon. Kutime en niaj kunvenoj nur unu konversacion sekvas la tuta ĉambro, sed kun dek, ofte ni havis du aŭ tri konversaciojn samtempe je malsamaj flankoj de la ĉambro. Nia grupeto apartiĝis teme.... laŭ politiko, lingvoj, komputiloj, kuirado. Kaj se iu aŭdis ion interesan, ili aliĝis al alia tema grupeto. Kaj ni iufoje grupiĝis laŭ lingva lerteco. Mi rimarkis tion lastan ankaŭ ĉe NASK en Vermonto. Komencantoj babilis kun aliaj komencantoj, progresintoj kun progresintoj, kaj la spertuloj gregiĝis. Dum la tuta vespero la grupoj ŝanĝiĝis inter si, al du grupoj, poste al tri grupoj kaj denove al unu grupo. Kiam ni havas vizitantojn, niaj kunvenoj estas multe pli interesaj.

— Reni Porter (kies adreso troviĝas en la Pasporta Servo)

KIEN VI IRIS?

Vendrede post la labortago, edzo ne revenis hejmen kiel kutime, sed pasigis la tutan semajnfino en la drinkejoj kun la amikoj. Sciante nenion, la edzino atendadis. Nur dimanĉe posttagmeze li revenis hejmen. La edzino plendegis, dirante, „Kien vi iris? La tutan semajnfino mi ne vidis vin! Kion vi pensus, se vi ne povus vidi min dum kelkaj tagoj?” La edzo respondis, „Nu, bone, ne estus problemo.” Kaj efektive, lundon la edzo ne vidis la edzinon dum la tuta tago. Dum mardo li ankaŭ ne vidis ŝin, nek dum la tuta merkredo. Finfine, ĵaŭdon posttagmeze, unu ŝvelita okulo de la edzo sufiĉe malfermiĝetis, por ke li povis ekvidi ŝin.



LA INTERMAKSILA OSTO

(latine: os intermaxillare, os incisivum)

En la Dua Mondmilito mi loĝis en Haarlem, Nederlando, urbo proksima al la Norda Maro. En la bordo ĉe la maro, en la dunoj, la germanoj konstruis sian *Atlantik Wall* (Atlantika Remparo). Ĝi konsistis el multaj bunkroj. Tuj post la milito la germanaj soldatoj forlasis la fortifikaĵojn kaj tiuj estis libere alireblaj por ĉiuj. Kun amiko mi esploris kelkajn bunkrojn, kaj en unu el ili mi trovis librojn. Mi kunprenis unu el ili kies titolo estis: *Alles um Liebe* ! (Ĉio pro Amo), la leteroj de Goethe el la unua duono de lia aĝo, dua eldono, 1910, en Leipzig, 431 paĝoj. En la mezgrada lernejo mi konatiĝis kun tiu fama germana poeto kaj verkisto: Johann Wolfgang Goethe, 1749-1832. Mi tre admiris lin, kaj en la daŭro de la tempo mi legis plurajn liajn verkojn. Nun denove mi decidis legi *Alles um Liebe*, kolekton de amleteroj, kiuj grandparte rilatis al lia amatino, Frau von Stein, edziniĝinta virino kiun Goethe pasie amis. Temas nun pri letero al ŝi skribita en Jena, germana urbo, je la 27a de marto, 1784:

„Al mi okazis rava ĝojo. Mi faris anatomian malkovron kiu estas grava kaj bela. Ankaŭ al vi mi devas ĝin konigi. Sed diru al neniu eĉ unu vorton. Ankaŭ Herder¹ mi informis pri tio letere, sed mi ĵurpetis ankaŭ lin silenti! Mi tiel ĝojas, ke ĉiuj miaj intestoj moviĝas.”

Nun la letero al Herder, skribita en Jena, je la 27a de marto, 1784:

„Instigite de la evangelio mi devas, plej rapide, sciigi vin pri la feliĉo, kiu trafis min. Mi trovis – nek oron, nek arĝenton, sed ion kiu donis al mi nekredeblan ĝojon – la intermaksilan oston ĉe la homo! Mi komparis kune kun Loder² la homan kaj la animalan kranion, kaj jen ĝi estas. Tamen mi petas vin: ne perfidu ion ajn, ĉar ĝi devas esti sekrete pritraktata. Certe ĝi tre kore ĝojigos vin, ĉar ĝi estas kiel la apoteozo por la homo, ĝi ne mankas, jen ĝi estas! Mi pensas pri ĝi lige kun via ‚Tutaĵo‘. Kiel belega tio fariĝos.”

Noto de la eldonisto:

La fama nederlanda anatomo Camper³ kredis, ke li trovis fundamentan diferencon inter la homo kaj la simio: ĉe la homo mankas la osto intermaksila. Sed ĉi tiu, tiel nomata mankata osto *intermaksila* estis ja montrita de Goethe.

Kio estas la osto intermaksila? Laŭ mia anatomia lernolibro ĝi estas malgranda osto inter la du duonoj de la maksilo, kaj ĝi enhavas la du tranĉdentojn. Ĝi tute kunkreskas kun la maksilo.

Kial tiu malkovro far Goethe tiel ĝojigis lin? Nu, li pruvis, ke estas rilato inter la homoj kaj la simioj. Goethe kredis pri la *unueco* en la naturo. Kaj en tiu mal-

kovro estis unu el la pruvoj! Imagu lian grandan ĝuon, trovi ion kiu koncernas la tutan homaron! Ĉar ĉiu el ni posedas ĉi tiun intermaksilan oston, ĉiu el ni estas iurilate parenca al la simioj, ĉi-kaze al la antropoidoj. Tiel estas la scienco. Science inventi estas por la homo tre tre ĝojige!

Goethe ne estis granda inventisto, sed danke al li, ni scias ion pri la deveno de ni, ni homoj,

Hein Wernik
Prinsenlaan 26
NL – 6542 T B Nijmegen
NEDERLANDO

1) Herder: Johann Gottfried Herder, 1744-1803, germana verkisto, teologo, mistikulo, originala pensanto, grava amiko de Goethe.

2) Loder: Justus Christian (von) Loder, 1753-1822, Profesoro de anatomio en Jena. Li estas aŭtoro de **Tabulae anatomicae** (Tabeloj anatomiaj), **Anatomisches Handbuch** (Anatomia Manlibro), kaj **Anfangsgründe der physiologischen Antropologie & Stats-Arzneykunde** (Fundamentoj de fiziologia Antropologio kaj Medicino).

3) Camper: Petrus Camper, 1722-1789, nederlandano. Universitata profesoro pri anatomio, ĥirurgio kaj filozofio. Goethe nomis lin: „Ein Meteor von Geist, Wissenschaft, Talent und Thätigkeit” (Meteoro de spirito, scienco, talento kaj agademo). Li okupis sin pri la kompara anatomio. Li komparis birdojn, mamulojn, simiojn kaj homojn. Li malkovris, inter aliaj aferoj, la aŭdorganojn de fiŝoj kaj la eniron de aero en la kavajn ostojn de la birdoj.

La Anatomia Turo (maldekstra en la bildo) pli-malpli kia ĝi aspektis en la epoko de

Goethe. Tie la poeto dissekcis (kun la anatomo, Loder) kaj faris sian malkovron, Nuntempe la turo estas grave disfaliĝinta, kaj oni strebas restaŭri ĝin. La turo estis parto de la konstruaĵoj de la Fakultato de Medicino de la Universitato de Jena, konstruita ĉirkaŭ 1750. Oni vidas ankaŭ parton de la biblioteko (dekstre). Litografajo fare de Carl Hirsch, 1858. Dank' al Manfred Scholz en Jena, kiu sendis la bildon al ni.

